

Te, pater Ioseph

Brevier-Himno

Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 1-an de majo > Sankta Jozefo, la laboristo > horo de la legaĵoj

*Te, pater Ioseph, opifex colende,
Nazaræ felix latitans in umbra,
vocibus lætis humilique cuncti
corde canamus.*

*Regiam stirpem tenuemque victum
mente fers æqua tacitusque portas,
sacra dum multo manuum labore
pignora nutris.*

*O faber, sanctum speculum fabrorum,
quanta das plebi documenta vitæ,
ut labor sudans, ut et officina
sanctificetur.*

*Qui carent escis, miseros foveto;
tempera effrenos perimasque lites;
mysticus Christus patriæ sub umbræ
tegmine crescat.*

*Qui Deus trinus simul unus exstas,
qui pater cunctis opifexque rerum,
fac patrem Ioseph imitemur actu,
morte imitemur.*

Amen.

Patro Jozefo, digna laboristo,
kiu feliĉis en la kaŝiteco
de Nazareto, el humilaj koroj
vin ni prikantas.

Reĝan devenon, magran vivo-staton,
ambaŭ vi portis sen orgojl' aŭ plendo,
dum vi la sanktan familion nutris
per viaj manoj.

Ho laboristo, bild' de l' laboristoj!
Kiom vi montras al la laborantoj,
ke laborejoj kaj labor' ŝvitiga
mem sanktigatas!

Helpu mizerajn, helpu malsatantajn,
bremsu senbridajn, baru malpacantajn,
kaj sub tegmento familia kreskos
Krist' la mistika.

Dio tri-unu, Patro de ni ĉiuj,
Vi, kiu ĉion per laboro kreis,
faru, ke ni per agoj kaj en morto
sekvas Jozefon.

Amen.

latina T: Evaristus el Anvers, 20-a jarcento

E: Albrecht Kronenberger 2009